

LA VERDA STELO



**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

aprilo 2011



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. (+31)(0)50 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. (+31)(0)505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouver
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. (+31)(0)50 301 40 15
retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. (+31)(0)51 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker,, N.R.Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 4 Helpokrio de la kasisto
Pri la nordo
- 9 Naskiĝtagvizito
- 10 Nieuwe media kans voor Esperanto
- 11 Dringend verzoek van de penningmeester
Malnova letero
- 12 Pri Reitdiep kaj la kluzo de Schapehals
- 14 Kapriol'!
- 15 Hamburga Somero

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2011

| | |
|---|---------|
| Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO) | € 12,50 |
| Gezinslid | € 6,25 |
| Donateur (minimaal) | € 7,00 |
| Abonnement LA VERDA STELO | € 7,00 |
| Over te maken op Ing banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum | |

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Nijkerk

| | |
|--|---------|
| Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X) | € 30,00 |
| Gezinslid | € 10,00 |

Klubkunvenoj

- 14 aprilo** solvi enigmojn
- 28 aprilo** nekonataj objektoj
Ĉu vi havas nekonatajn objektojn?
Kunportu, rakontu, montru.
- 12 majo** 19.00 h kune manĝi
Ĉu vi volas kune manĝi?
Sendu retmesaĝon al *nrkielklunder @ hotmail.com*

Someraj renkontiĝoj

- 9 junio** 10 h Schimmelpenninckhuys
- 7 julio** 10 h Scandinavisch Dorp
- 4 aŭgusto** 11 h Hoornse meer, apud Dreesflat
kunportu vian lunĉon

- 1 septembro** pri la ferioj
- 15 septembro** statuoj en Groningen
- 29 septembro** poemoj
- 13 oktobro** malferma vespero
- 27 oktobro** gastpreleganto
- 10 novembro** proverboj
- 24 novembro** gramatiko
- 8 decembro** festvespero

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo
sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

majo

- 5 Gonda Kruijer
- 7 G.C. Boer
- 11 J. Hennekam-Tijs
- 11 J. van der Laan
- 23 Frans Schild
- 25 A. Hoekstra
- 27 W. Renken

junio

- 1 A.M. Oosterwijk-Dominicus
- 8 H. van Dalen
- 16 Harm Roeters
- 24 W. Rijnders
- 24 J. Snoek

aŭgusto

- 10 Nelly Kiel-Klunder
- 16 Koos Scharroo
- 30 Johan Swenker



Helpokrio de la kasisto

En la antaŭa informilo mi urĝe petis vin post nelonge transkontigi la ŝulditan sumon por via membreco aŭ abono de la jaro 2011. Feliĉe multaj el vi jam respondis al tiu peto, kaj mi sincere dankas tiujn membrojn kaj abonantojn.

Sed ŝajne ne ĉiuj komprenis mian peton, kaj pro tio mi ĝin ripetas kaj nun pli laŭte.

“Se vi ne jam pagis vian kotizon aŭ la abonon bonvolu transkontigi la ŝulditan sumon kiel eble plej baldaŭ!”

Mi antaŭdankas vin pro via “prokrastita” kunlaboro.

Luit Staghouver

Pri la nordo

9 decembro

La festvespero

Malalta estis la temperaturo la 9-an de decembro. Kuŝis neĝo sur la stratoj, kiuj jen kaj jen estis ege glataj. Tio verŝajne estis la kaŭzo, ke dum la festvespero ni ĉeestis nur sesope.

Kvar anoj, Gonda, Wiebren, Koos kaj Richard, sciigis al ni, ke ili ne povos ĉeesti.

Kiam ni alvenis, ni metis sur tablon la diversajn manĝ- kaj trinkaĵojn, kiujn ni kunportis.

Post bonveno de la prezidanto ni trinkis kafon kaj babilis pri diversaj temoj. Ineke ĉeestis la jarkunvenon de NEJ (Nederlanda Esperanto-Junularo).

Wil petis la opinion de la aliaj pri

demando en Interreto tien meti liston kun la nomoj de ĉiuj en la mondo, kiuj parolas Esperanton, por ke ni povu respondi la demandon pri la nombro de Esperanto-parolantoj en la mondo. Kio estas via opinio pri tio? Sciigu tion al la estraro!

Luit kunportis tre bongustan tomat-supon, kiun li prezentis al ni. Wil voĉlegis retmesaĝon de amikino pri ŝia restado en Kubo dum la kongressemajno ĉi-somere. Johan, kiu ĉeestis la UK-on en Kubo antaŭ dudek jaroj, rekonis multon el tiu raporto, do verŝajne ne multe ŝanĝiĝis intertempe. Luit raportis pri Joseph en Pollando, kiu provas akiri permeson por finstudi en tiu lando. Ĝis nun li ne perdis la kuraĝon, kvankam lia tiea restado estas necerta. Ni, esperantistoj, de tempo al tempo subtenas Joseph finance, se necesas.

Tiam ni iris al la tablo kaj plenigis nian teleron laŭguste. Ĉiuj manĝaĵoj tre plaĉis al ni! Johan kunportis kiel deserton glaciaĵon kun kremo!

Ineke kunportis la *Ludon de la Nuda Vero*. Ni provis ĝin ludi.

Ĉar estis nia lasta klubkunveno en 2010, ni deziris unu al la aliaj agrablajn festotagojn.


6 januaro

La unua kunveno de januaro okazis tuj post la naskiĝdato de Wil. Ŝi tial regalas nin per memfarita torto. Pro Sankta Nikolao ŝi havis spicojn por la tipe nederlanda spickukaĵo. La torto gustis preskaŭ simile.

Ni parolis pri diversaj aferoj. La programo ja estis *vivanta gazeto*. La plej grava afero komence de januaro estis granda brulego en *Moerdijk* ĉe firmao, kiu miksas kemiaĵojn.

Wil kunportis kompletan gazeton. Pro la malbona vetero ŝi venis per taksio. Por la veturo hejmen ŝi mendis la taksion veni inter kvarono antaŭ la deka kaj kvarono post la deka. Kaj tio signifas, ke ŝi devas atendi iom da tempo. Por pasigi la tempon ŝi do havas gazeton. Sed ĉi-foje la gazeto taŭgis ankaŭ pro la temo de la vespero.

20 januaro



Dum la kunveno de la 20-a de januaro ni havis gaston: *Ralph Schmeits*. Kune kun *Rob Moerbeek* li tradukis la broŝuron *Ontdek het Esperanto, een fascinerende taal*. Li parolis iomete pri la broŝuro mem, sed principe pri la laboro ĝin traduki. La broŝuro simple estas varbilo, simile kiel *Sleuteltje*. Kelkaj homoj ŝatas havi vortareton, aliaj homoj preferas multkoloran broŝuron. Kaj *Ontdek* estas tia broŝuro.

Rob kaj Ralph ambaŭ tradukis unuope kaj poste siajn tradukojn komparis. Poste provlegantoj kontrolis la nederlandan tekston. Dume ili uzis ankaŭ tradukon jam ekzistantan. Tiu antaŭa traduko estis preparita de kvin personoj, kies nomoj

estas en la nuna broŝuro.

Ni mem devis traduki kelkajn frazojn por sperti kiel malfacile estas traduki broŝuron. La nura simpla frazo: *Esperanto estas lingvo, kiel aliaj homaj lingvoj* alvokis diskutojn. Por la broŝuro ili elektis:

Esperanto is een taal zoals andere talen.

La provlegantoj povis diri, ke en la nederlanda la komo ne necesas. Alia frazo, kiun ni devis traduki estis: *en la komenco de la 20-aj jaroj*. La provlegantoj konsilis simple uzi vortojn anstataŭ ciferojn. En paĝo 22 de la broŝuro vi nun povas trovi la tekston: *in het begin van de jaren twintig*.

Legante ĉi tiun Esperantan tekston, vi do scias, ke oni povas fari vortojn, uzante prefiksojn kaj afiksojn. La broŝuro klarigas tion, uzante la ĉefvorton *manĝi*. Interesa estas la traduko de *manĝaĉi*, la nederlanda lingvo povas esprimi tion nur per frazeto: *onsmakelijk eten*.

En la broŝuro estas artikoletoj pri Esperanto-kulturo. Pri Kultura Esperanto-Festivalo estas skribite, ke nokte estas *gufujo* (trankvila loko por trinki teon kaj babili). Eĉ en Esperanto oni klarigis la vorton *gufujo*. Kiel traduki ĝin? Nu, *gufu* estas speco de strigo; Rob elpensis kiel nederlandan tradukon *oehoe-hoek*. Rob kaj Ralph multe diskutis, ankaŭ kun Stano Marček, la aspektigisto. Ĉu ĉiu paragrafo bezonas numeron, aŭ nur la ĉapitroj? Ĉu la nomo de la lingvo, Esperanto, bezonas artikolon, aŭ ne? La provlegantoj konsilis jenan metodon: anstataŭigu 'Esperanto' per alia lingvo. Kiam vi aŭdas, ke vi bezonas artikolon antaŭ 'Engels' aŭ 'Frans', tiam uzu ĝin ankaŭ antaŭ Esperanto. Do tial la titolo de la broŝuro fariĝis *Ontdek het Esperanto*.

Sed tuj ili havis novan problemon: kiam ili

tajpis la du liniojn *Ontdek* kaj *het Esperanto*, tiam la broŝuro ne plu temis pri Esperanto sed pri 'malkovri'. Tial ili decidis meti la artikolon ne en la duan sed en la unuan linion.

Ontdek het Esperanto



Ontdek het Esperanto

Se vi komparas la nederlandan broŝuron kun la Esperanta, vi konstatas multajn etajn diferencojn. Kaj ĉiu diferenco estas intenca, do ĉiu diferenco estis preparolita. Diskuti pri ĉiuj detaloj kostis multe da tempo: ili bezonis tutan jaron por la tradukado. Sed Ralph diris ankaŭ, ke ĝuste tiuj diskutoj faris la tradukadon interesa. Ĉi tiun entuziasmon li klopodis transdoni al la aŭskultantoj. Ĉe mi li sukcesis. Kaj eble mi sukcesos transdoni ĝin al vi per ĉi tiu artikoleto.

3 februaro

Ĉeftemo de la kunveno: *Gramatiko*.

Unue ni iom babilis pri la hejmeca naskiĝtaga festo de Ineke, pri la situacio de Joseph en Pollando, pri malbonŝanca Bets, kiu ekglitis, pro kio ŝi rompita al si la femuron, kaj pri artikolo en la *Leeuwarder Courant* pri *Douwe Beerda* kaj Esperanto. Wil kunportis gramatikajn ekzercojn,

kiujn kompilis Rob Moerbeek. La ekzercoj estis interesaj kaj instruaj. Tradukendaj frazoj de Rob estas troveblaj en la retpaĝo de *Esperanto Nederland*. Kvankam Esperanto estas lingvo relative facile lernebla, tamen ankaŭ en tiu lingvo la nombro da malfacilaĵoj estas sufiĉe granda.

17 februaro

Dum la kunveno de la 17-a de februaro okazis nia jarkunveno kun kelkaj oficialaj aferoj, kiel la elekto de novaj estraranoj. La triopo Johan, Luit kaj Nelly restos nia estraro.

Luit anoncis, ke Gonda Kruijer kaj Richard Hofman konsistigas la kaskontrolan komisionon. Frans Schild estas anstataŭanto. Alia ero de la jarkunveno, kiun vi certe volas scii, estas ke la kotizo en 2012 restos la sama kiel en 2011.

Rigardu en la kolofonon por la detaloj. Fine la kunvenejo: kvankam kelkfoje venas nur malmulte da homoj, ni decidis kunvenadi en la Dreesflat. Kelkfoje la salono estas plena.

Pli oficiala raporto aperos antaŭ la sekva jarkunveno, sed la gravajn aferojn vi scias jam nun.

Babilante, ni aŭdis, ke Wil vizitis sinjorinon *Leeuwerke-Kiers*, kaj ke la klubo en Bremeno organizos festan kunvenon en la 21-a de majo. Sed preskaŭ ĉiu, kiu ĉeestis nian jarkunvenon, jam havas alian okupon en tiu tago.

Ineke diris, ke ŝi vojaĝos al *Kosice*. Ŝi veturos per flugmaŝino. En Budapeŝto ŝi devus flugmaŝinŝanĝi por la lasta parto de la vojaĝo, sed la bileto mencias 'buson'. Ineke pensis pri la flugmaŝinoj de la eŭropa firmao *Airbus*. Sed tiun vojaĝon faras nur tiel malmulte da homoj, ke vere estas aŭtobuso per kiu ŝi veturos al la

flughaveno de Kosice.

Ĉu vi jam anoncis vin al la *Nederlanda Esperanto-Kongreso* dum la pentekosta semajnfino? Ĝi okazos en *Münster*. Ineke estas LKK-ano. Ĝi estas ankaŭ Germana Esperanto-Kongreso. Tial eksterlandanoj ricevos rabaton. Rigardu <http://esperanto.de/gea/GEK2011.html> por la detaloj.

3 marto

Temo de la kunveno: *Kompari du tradukojn*.

Antaŭ ol ni okupiĝis pri la tradukoj, ni babilis pri:

- la venonta UK en Kopenhago
- la situacio de Joseph

En la Dua Bulteno de la UK estas sciigoj i.a. pri ekskursoj kaj (multekostaj) tranoktejoj.

Post la kongreso Wil flugos al Prago, por ĉeesti KELI-kongreson en *Podebrady*. De tie ŝi intencas vojaĝi trajne al Pollando. Post la ferioj ĉe amiko en Pollando ŝi veturos hejmen aŭtobuse, kiel ankaŭ al Kopenhago.

En Lodz prosperas la studo de la kongano Joseph. Lia unua peto pri la statuso de rifuĝinto estas rifuzita triafoje, nun de la korto en Varsovio. Intertempe oni okupiĝas pri la dua peto.

Wil kunportis du tradukojn de la fabelo *De standvastige tinnen soldaat* de la dana verkisto *Hans Christian Andersen*.

La traduko *Persista stana soldato* estas de Zamenhof, *La brava stansoldato* estas de la dana Esperanto-pioniro *Frederik Skeel-Giörling* (1876-1910), kiu tradukis ankaŭ kelkajn aliajn fabelojn de Andersen.

Ne nur la titoloj de la tradukoj malsimilas, sed ankaŭ enhave estas pluraj malsimilaĵoj. Jen kelkaj en la unua parto de la tradukoj:

| | |
|---|--|
| Zamenhof | Skeel-Giörling |
| Stanaj soldatoj | Stansoldatoj |
| Malgranda knabo | Knabeto |
| Plaŭdante per la manoj | Kunfrapis la manojn |
| Ĉiu soldato similis la alian plej precize | Ĉiuj soldatoj tute egale aspektis |
| Kastelo | Palaco |
| Ĉirkaŭ la arboj estis peco da spegula vitro | Kreskis arboj ĉirkaŭ speguleto (fikcia lageto) |
| Cignoj speguliĝadis en la lageto | Cignoj sin spegulis en la lageto |
| Malgranda knabino | Fraŭlineto |
| La soldato kuŝiĝis malantaŭ flartabakujo | Li kuŝiĝis post la flartabakujo |
| Ne perdante la ekvilibron | Ne malekvilibriĝante |

17 marto

Kvinope ni kunvenis la 17-an de marto 2011. Du protokolojn voĉlegis Johan, kaj Luit unu. Wil voĉlegis du artikolojn, kiujn ŝi verkis por La Verda Stelo. Ineke rakontis pri sia unua trajnvojaĝo al Amsterdamo, pri kiu ŝi verŝajne verkos artikolon. Cetere ni parolis pri la nuntempaj okazaĵoj, inter ili la katastrofoj en Japanio, pri kiuj oni multe raportas televide.

La temo de la vespero estis: *Groningena ludo*. Ni do supozis, ke ni ludu, sed la intenco estis, ke ni la ludon kune faru. Do, ĉiu el ni devis noti 10 demandojn, kiuj rilatas al Groningeno aŭ Nederlando.

Johan konstatis, ke dek estas granda nombro! La rezulto de ni ĉiuj kune estis 36 demandoj! Jen kvin el ili:

- En kiu parto de Nederlando situas Groningeno?
- Kia ventmontrilo staras sur la Martini-turo?
- Ĉu estas vere, ke iam estis alfluo kaj refluo en la groningenaj kanaloj?
- Kiu donacis la urboparkon al la groningenanoj?
- Kiu statuo troviĝas antaŭ la stacidomo en Groningeno?

Estas la intenco, ke la demandoj staros sur kartetoj, kiuj kuŝas kiel stoko sur la tablo apud ludtabulo. Per ĵetkubo la ludantoj provos atingi la mezon de la ludtabulo, respondante la demandojn, kiujn post indiko ili devas preni de la stoko. Ĉu iu el vi emas ellabori la ideon?

Naskiĝdatvizito

La 21-an de decembro 2010 estis la naskiĝdatreveno de s-ino Leeuwerke-Kiers, jam dum multaj jaroj anino de nia klubo. Telefone mi informpetis antaŭe pri ŝia aĝo. Montriĝis, ke ŝi iĝos pli ol 90-jara. Ĉar ni ne scias la naskiĝdatojn de niaj anoj, povas okazi, ke la 90-a festotago pasas sen speciala atento de ni, krom la gratulkarto nome de nia klubo, kiun ĉiam akurate forsendas Gonda.

Mi aŭdis, ke vizito estos tre prezata, do kiam iĝis malpli malvarme, mi aŭtobusis al *Zuidlaren* kun floroj por ŝi. Ĉar mi ne sciis kie troviĝas la maljunulejo, en kiu ŝi loĝas, mi serĉis per interreta programo la manieron plej rapidan kaj komfortan por atingi ŝin.

Ho ve, la transiro de unu buso al alia en *Vries* ne sukcesis pro malfruiĝo de la unua buso. Tio signifis, ke mi devos atendi unu horon rande de la ŝoseo. Horon en la

malvarmo, sen ebleco eniri iun ejon. Malproksime mi vidis grandan konstruaĵon. Tien mi iris, transirante herbejon. Montriĝis esti la urbodomo de *Vries*. Mi renkontis tie tre afablan sinjorinon, kiu permesis al mi sidi en la halo, viziti la necesejon, kaj ŝi eĉ donis al mi tason da kafo. Post unu horo mi daŭrigis mian vojaĝon al s-ino *Leeuwerke*. Estis agraba vizito. Se mi iam denove estos en *Zuidlaren*, mi certe ĝin ripetos. Se estas pli da anoj, kiuj iĝos 90-jara, sciigu tion al ni, kaj se vi aprezas tion, iu el ni tiam volonte vizitos vin kun floroj. - *Wil*



Nieuwe media kans voor Esperanto

Leeuwarder Courant, 29 januari 2011, pag. 10



Esperanto wordt vaak geassocieerd met 'iets van vroeger'. Maar de wereldtaal is springlevend dankzij internet, Facebook en Skype.

Bizar makkelijk.

Zo noemt de 27-jarige Douwe Beerda uit het Noorse Oslo de wereldtaal Esperanto. Beerda werd geboren in Kollum, groeide op in Ter Idzard en maakte zes jaar geleden kennis met het Esperanto. Inmiddels is hij bestuurslid van de Nederlandse Esperanto Jongeren. Sinds 1 januari is de hoofdstad van Noorwegen zijn woonplaats. Ook dat is te danken aan Esperanto.

Op een jongerenbijeenkomst van de wereldtaal in Duitsland drie jaar geleden leerde hij zijn huidige Noorse vriend kennen. "Van het een kwam het ander en nu ben ik hier op zoek naar werk in de energie- en milieubranche."

Thuis spreken de twee Esperanto met elkaar. Verder gebruikt Beerda de taal vooral om films te kijken die de bioscopen niet halen. "Zo zijn er heel mooie Koreaanse en Tsjechische films."

Via internet heeft hij een site ontdekt van een Rus die films in het Esperanto vertaalt,

maar ook van een Canadees die in deze taal een hele grappige podcast heeft. "Er zijn dus geen technische barrières meer om het daadwerkelijk toe te passen."

Tijdens zijn studententijd in Groningen raakte Beerda geïnteresseerd in de taal die de Pool Ludwik Lejzer Zamenhof in 1887 bedacht om de Duitsers, Polen, Joden en Russen om hem heen beter met elkaar te kunnen laten praten. Hij dacht dat spanningen tussen volken konden verminderen als er een taal is die alle nationaliteiten overstijgt.

Beerda nam twee uur per week les en had de taal in een half jaar onder de knie. "Het is echt heel makkelijk. Alles is regelmatig. Er zijn maar zestien grammaticaregels, onregelmatige werkwoorden bestaan niet en er wordt ook niet gewerkt met uitgangsvormen." Al gauw sprak de Fries het Esperanto beter dan het Frans en Duits dat hij op de middelbare school in Wolvega leerde.

Vooraf voor zijn reizen wilde Beerda zijn nieuwe taal inschakelen. Esperantisten onderhouden onderling een netwerk om gratis bij elkaar te logeren. Pas tijdens die reizen, met name in het Midden-Oosten, ontdekte Beerda hoe groot het taalprobleem is. "Ik spreek Nederlands, Fries, Engels, Duits en Frans en toch kwam ik nergens met die talen." Daar komt volgens hem bij dat Nederlanders en Scandinaviërs over het algemeen vrij goed Engels spreken, maar dat is in Zuid-Amerika of landen als Frankrijk en Spanje niet het geval. "Probeer met een Zuid-Amerikaan maar eens een goed gesprek in het Engels te voeren." Via het Esperanto legde Beerda wel makkelijk contacten met bijvoorbeeld Vietnamezen en Koreanen. Of hij bij het leren van de taal voordeel

heeft gehad van zijn Friese afkomst, weet Beerda niet. "Maar het Esperanto wil zeker geen regionale talen verdringen. Het uitgangspunt is juist respect voor de regionale en de nationale taal en daarbuiten op internationaal gebied het Esperanto. Dan hoef je niet allemaal elkaars nationale taal te leren."

Met een kleine 2 miljoen sprekers heeft de wereldtaal in korte tijd al veel bereikt, vindt Beerda. Wel constateert hij dat er een gat is bij de generatie tussen 35 en 60 jaar. "Zij zien het Engels vaak als ideaalbeeld, maar met Esperanto leer je een veel grotere wereld kennen. Alleen moet het wel vrijwillig gaan. Je moet er zelf behoefte aan hebben."

Dringend verzoek van de penningmeester

In de vorige "informilo" verzocht ik iedereen (voor zover van toepassing) de contributie of het abonnement voor 2011 binnenkort te betalen. Schijnbaar heeft niet iedereen mijn verzoek begrepen of denken diverse personen abusievelijk dat ze al hebben betaald. Voor hen is dit tweede verzoek bedoeld.

"Als je nog niet hebt betaald, zou je dat dan alsnog "kiel eble plej baldaŭ" willen doen?"

Alvast mijn hartelijke dank.
Luit Staghouwer

Malnova letero



En la jaro 1947 skribis juna hungaro leteron en la angla lingvo al litografa firmao en Svedio kun la peto, ĉu eblus labori tie dum iom da tempo por akiri internacian sperton en la metio, kiun li finstudis. Je lia miro alvenis reago, ne en la angla lingvo, sed en Esperanto. Kion reskribis la estro de la firmao?

Unue pardonon, ke mi ne respondas al vi en la angla lingvo. Estas tiel, ke mi ne scias la anglan lingvon. Vere ĝenerale estas tiel, ke la angla lingvo ne estas tiel disvastigita en Svedio, kiel oni eksterlande volas kredi. Do, mi permesas al mi skribi Esperante. Certe fariĝas al vi malfacilaĵoj traduki ĝin. Sed mi scias, ke en Hungario troviĝas multaj esperantistoj. Vi do sufiĉe facile povas trovi helpon traduki la leteron.

La sinjoro, kiu donis antaŭ nelonge ĉi tiun leteron al mi, ne estis akceptita en Svedio. La kialo estis, ke pro manko de materialoj, speciale papero, jam estis tie kelkaj senlaboraj kolegoj. En Nederlando li havis pli da sukceso. Tie li trovis laboron, lernis rapide kaj tre bone la nederlandan lingvon. Jam dum multaj jaroj li nun estas unu el ni, nederlandanoj.

Wil

Pri Reitdiep kaj la kluzo de Schapehals (teksto kaj fotoj: Luit Staghouwer)

La urbo Groningeno dum jarcentoj havis malferman ligan al la *Laŭversmaro*. La norda haveno estis tajda haveno kaj la nomoj de la apudaj stratoj *Hoge der A* kaj *Lage der A* referencas ankoraŭ al tiu periodo. Sed en 1877 oni finkonstruis kluzon en *Zoutkamp* kaj de tiam la tajdo ne plu influas la akvonivelon en la urbo Groningeno.



La iama malferma ligilo kun la maro estas la rivero *Reitdiep*, kiu fluas de la norda haveno al la *Laŭversmaro* kaj estas grava por la drenado de la troa akvo en grandaj parto de la provinco Groningeno kaj la norda parto de Drento. La unua parto de *Reitdiep* (Groningen-Wierumerschouw) estas la (en 1385) kanaligita suba fluo de la rivero *Drentsche Aa*. La daŭrigo de *Reitdiep* (Wierumerschouw-Zoutkamp) estas la kanaligita suba fluo de la rivero *Hunze*. Ĝis kiam (en 1969) la *Laŭversmaro* iĝis *Laŭverslago*, *Zoutkamp* estis fiŝista haveno.

Pro la kanaligado de la riveroj *Drentsche Aa* kaj *Hunze* la 'traveturenda distanco' inter la urbo Groningeno kaj la *Lauversmaro* fariĝis 15 kilometrojn malpli longa. Precipe kiam la ŝipoj ne jam havis motorojn, la avantaĝo por la ŝipveturant-oj estis granda.

Oriente de *Reitdiep*, inter la urbo Groningeno kaj *Schaphalsterzijl* (la kluzo de *Schapehals*), ankoraŭ videblas en la pejzaĝo la iamaj meandroj de la riveroj *Drentsche Aa* kaj *Hunze*, ekzemple la 'Oude Diepje' proksime al *Winsum*.

Reitdiep kaj ĝia ĉirkaŭaĝo, precipe la regiono inter la *Van Starckenborgkanaal* kaj la *Winsumerdiep* estas ekologie tre interesa, kaj grandaj partoj nun estas naturrezervejoj.

Ne nur *Reitdiep* estas kaj estis grava por la defluo de la troa akvo en la norda parto de la provinco Groningeno. Estis kelkaj aliaj defluejoj al la maro, sed pro la altiĝo de la eksterdigaj grundoj kaj la konstruado de digoj tiuj defluejoj ne plu estis uzeblaj, kaj oni devis trovi solvon.

Pro tio oni fosis kelkajn interligajn kanalojn inter kiuj estas parto de *Winsumerdiep*. Norde de la vilaĝeto *Schapehals* *Winsumerdiep* ekhavis ligan kun *Reitdiep*. En 1459 oni tie konstruis la unuan kluzon (el ligno): la kluzo de *Schapehals*.

Poste oni plurfoje renovigis la kluzon. En 1995 oni decidis malkonstrui la malnovan kluzon kaj anstataŭigi ĝin, kaj ankaŭ konstrui drenejon. Ili necesis pro la daŭra malaltiĝo de la tero, kio estas sekvo de la elfosado de gaso en la nordo de la provinco Groningeno. Pro la malaltiĝo de la tero la akvonivelo en tiu regiono altiĝis kaj kaŭzis problemojn.



Dum dek jaroj oni diskutis pri la demando "Ĉu necesas malkonstrui la kluzon, kaj kie oni starigos la drenejon?" Multaj homoj timis, ke drenejo en aŭ sur la digo de Reitdiep difektos la historian pejzaĝon de *Schaphalsterzijl*. Finfine oni decidis konstrui malaltan drenejon sur la bordo de *Winsumerdiep*, apud la denove renovigita kluzo. En novembro 2005 la drenejo kaj la renovigita kluzo estis pretaj.

Konata vilaĝo je la bordo de Reitdiep estas *Garnwerd*. *Schaphalsterzijl* estas malpli konata kaj multaj homoj neniam aŭdis pri la vilaĝeto *Schapehals*. Tio ne estas miraklo. En *Schapehals* troviĝas nur kelkaj bienoj kaj nur antaŭ kelkaj jaroj oni tie starigis tabulon kun tiu stranga nomo. La nomo referencas al tiea iom pli mallarĝa parto ('kolo') de Reitdiep.



Ankaŭ la konstruaĵoj en *Schaphalsterzijl*

ne multas. Krom la nova drenejo estas tri aliaj konstruaĵoj: loĝejo apud la drenejo, kaj sur la transa bordo de *Winsumerdiep* estas la malgranda biendomo en kiu antaŭe loĝis la kluzisto, kaj budo el ligno (laborejo). La loĝejo de la kluzisto kaj la laborejo nun estas monumentoj.

De kiam Groningen ne plu havis malferman ligan kun la maro, la digoj de *Reitdiep* ne plu necesas por ŝirmi la apudan pejzaĝon kontraŭ la influo de la tajdo. Sed la digoj estas gravaj partoj de la pejzaĝo.



Unu el la biendomoj flanke de *Reitdiep* havas historian nomon: *Hunzebocht*. Post la renovigado de la kluzo oni starigis informtabulon apud la kluzo. Sur la renovigita kluzo troviĝas ŝildo (ventflago) kun la blazono de la poldera administracio, kiu dum multaj jaroj respondecis pri la kanaloj ktp. en ĉi tiu regiono (*Waterschap Hunsingo*). *Hunsingo* nun estas parto de la poldera administracio *Noorderzijlvest*.



Kapriol'!

La balfolk-dancgrupo Kapriol'!, kiu iam estis ĉe ni, fartas bone! Ekde aprilo 2009 la grupo prezentis sin dek-unufoje. Ili estis en Hispanio, Danlando, Germanio, Nederlando, Belgio, Pollando kaj Francio. Ekde aprilo 2009 novaj prezentadoj sekvas en Nederlando, Belgio, Francio, Germanio. La 26-an de junio komenciĝos turneo tra Usono, kie ili prezentos sin interalie en *Mystic, Connecticut* kaj en *Altamont, Novjorko*.

En Interreto ili estas aŭdeblaj kaj videblaj je <http://www.kapriol.org/>

Speciale la kanto *La dolĉo de la majo* kun bildoj tre plaĉas al mi.

Mi deziras al ili multan sukceson. - Wil.

Interasocia Esperanto Renkontiĝo ĉe Mediteraneo
Seto de la 22a ĝis la 26a de aprilo 2011

Vendrede 22a en Lazaret 20a 30 Sabate 23a kino Comœdia 20a 30

FaMo Dominique Gautier prezentas sian filmon «Esperanto» premiere

Sabate 23a en teatro Georges Brassens 22a **Esperanto FILMO**

Jacques Yvart kantas Georges Brassens en Esperanto

Dimanĉe 24a en teatro Georges Brassens 21a

KAPRIOL' Kapriol! frisa folkmuziko kaj Tiel Plu tradicia kataluna balado

Lundne 25a en Lazaret 21a TTT: Teatro Trupo de Tuluzo Patric: okcitana kantisto JoMo kaj Sofniŝka: slava etoso

IRSEM 2011 gée IFA fet Ithau Aŝtado sete

<http://esperantosete2011.fr>



Ni deziras al vi agrablajn pasko-tagojn



**18 - 23
JULIO
2011**

**Antaŭ la UK en Kopenhago vizitu la
Eŭropan Verdajn Ĉefurbon Hamburg!**

Hamburgo somere 2011 bonvenigos vin.

Pro la Universala Kongreso multaj esperantistoj el la tuta mondo vizitos la danan ĉefurbon Kopenhago fine de julio 2011. Sude je 300 km – ĵus antaŭ la UK - en la germana metropolo kaj havenurbo Hamburgo okazos kvintaga internacia renkontiĝo. La *Hamburga Esperanto-Societo* bonvenigos esperantistojn "survoje al Kopenhago" en nia belega verda grandurbo, de la 18-a ĝis la 23-a de julio 2011. Post sukcesaj *Hamburga Somero* antaŭ la UK Gotenburgo (2003) kaj la germana Esperanto-kongreso en 2007 ni preparos denove etan plenan internacian renkontiĝon.

La programo okazos partatempe en nia nova sidejo - kulturdomo en la vigla densa kvartalo *St. Georg*. La multnacia urbo-kvartalo en proksimeco al la urbocentro havas aŭtentikan atmosferon. En la agraba kulturdomo kun restoracio/kafejo ni okazigos la teman programon. Dum la prelegoj kaj diskuttrondoj vi ekkonos la historion de nia hansa urbo kaj de la loka E-movado. En 2011 Hamburgo estos la "mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo". Ni prezentos kaj diskutos la ekologiajn aspektojn de urba vivo. Koncerne tiu temo okazos ekskursoj al parkoj kaj verdaĵoj, veturadoj per novtipaj ekologiaj trafikiloj kaj vizitoj al grandega

novkonstruata apudhavena kvartalo.

Por prezenti kelkajn nekonatajn ĉirkaŭaĵojn de Hamburgo, ni planas ekzemple tutagan ekskurson al la "sveda" urbeto *Stade*, kiu vizitindas pro ĝia trankvila historia centro kaj haveno. Post la ekskursaj kaj tema programoj vi povas amuziĝi dum distraj vesperoj, ekzemple en la fama "ruĝa" kvartalo *St. Pauli / Reeperbahn*. Dum la lasta vespero estos somera festo en la ĝardeno de la kulturdomo.

Kotizo:

- la tuta tempo: € 35,- p.p.
- 3 tagoj: € 25,- p.p.
- unutaga bileto: € 10,- p.p.

La kotizo inkluzivas la programon kaj informmaterialojn. La loĝo-, manĝo- kaj transportkostojn vi pagu mem. Ni helpas trovi malmultekostajn hotelojn, disponigante hotelliston, organizos grupobiletojn por la publikaj transportiloj, rekomendos restoraciojn kaj faros ĉion eblan por agraba, senstreĉa kaj impresoriĉa restado dum la renkontiĝo.

Hamburga Esperanto-Societo esperas renkonti vin dum *Hamburga Somero*.

Ĝis la revido en Hamburgo!

Detalajn informojn vi trovos sur nia interreta paĝo

www.esperanto-hamburg.de/hoso

Sylvia Pöhlmann

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen